

TEA-BULTENO

3^a JARO

JUNIO 2000

NUMERO 6



AGENDO



- 1 Ĵ
- 2 V Kartludado
- 3 S
- 4 D
- 5 L
- 6 M Ordigo de TEA-arkivo
- 7 M
- 8 Ĵ
- 9 V Kio esplorinda en la reto?
- 10 S
- 11 D
- 12 L
- 13 M Ordigo de TEA-arkivo
- 14 M
- 15 Ĵ
- 16 V Franko LUN kaj familio gastas ĉe ni!
- 17 S
- 18 D
- 19 L
- 20 M Ordigo de TEA-arkivo
- 21 M
- 22 Ĵ
- 23 V Via opinio pri TRIESTO 2001
- 24 S
- 25 D
- 26 L
- 27 M Ordigo de TEA-arkivo
- 28 M
- 29 Ĵ
- 30 V Mediteranea gustumado



Ĉiuj al Monte Lussari!

Dimanĉon la 4^{am} de junio aŭtomobila karavano de esperantistoj celos la supron de Monto Lussari.



Triestanoj rendezuos akurate je la 7^a kaj duono en Placo Oberdan: kune oni veturos direkte al Valbruna, ĝis la telfera stacio piede de la monto, kie, je la 9.30, oni renkontiĝos kun alia grupo de amikoj el Aŭstrio, Slovenio kaj nia regiono.

Je la 11^a horo okazos Di-servo (espereble esperantlingve) en la antikva Preĝejo de Sankta Maria. Oni tagmanĝos ĉe surloka restoracio. Kosto de la aranĝo, kiu inkluzivas telferan veturon kaj plenan tagmanĝon (inkluzive de kvaron-litra vino), egalas al 40 mil liroj.

Por pliaj informaj detaloj kontaktu marde kaj vendrede (h. 19.30-22.00) TEA-sekretarion.



??? ENIGMO ???

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 65 literoj.

7, 6, 47, 13, 2, 29, 4, 9, 38, 14 = kantanta birdeto

48, 5, 18, 27, 61, 52, 41 = manĝaĵo farita el lakto

23, 3, 15, 50, 22, 58, 44 = ĉiutaga legaĵo

10, 56, 34, 40, 59, 11, 35, 65 = pinglo-kovrita besto

12, 30, 43, 39, 15, 24 = arbara besteto

25, 63, 50, 8, 37, 62, 26 = lumigilo

1, 36, 55, 20, 4, 18 = urbejo en Ameriko

54, 28, 45, 16, 32, 49 = fariĝi senakva

19, 46, 42, 51, 13, 17, 7, 14 = oficiro

21, 57, 48, 53, 59, 41 = milda vento

4, 62, 20, 30, 33, 61, 64, 44 = somera frandaĵo

27, 31, 60, 38, 65 = tre dolĉa manĝaĵo

1 → 65 = historia konstato, bonege aplikebla ankaŭ al Esperanto.

Inter tiuj kiuj sendos, antaŭ la 15^a de julio, la ĝustan respondon, estos lotumitaj du libro-premioj.

El LA PRAKTIKO - N° 47 - Jaro 1935

En la TEA-BULTENO de aprilo, aperis kvizo rilata al artikolo titolita «FRENEZA MONDO».

Demando estis: En kiu jaro kaj de kiu ĝi estis skribita? En kiu revuo publikigita? Malmultaj respondoj alvenis, kaj el tiuj neniu korekta.

Por la scivolemuloj, jen la solvo:

Jaro - 1933; Aŭtoro - ANDREO CSEH; Revuo - LA PRAKTIKO, la Gazeto kiu instruas kaj amuzas.

La nealjuĝitajn premiojn ni flankemetas por la ĉi-supre prezentita kvizo, esperante je pli nombra partopreno. Bonan amuziĝon!

Granda parofisto, malgranda faristo.

L.L.Z.

Survoje al Eŭropo

VIGLO

Nekontesteble sukcesa la 4^a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso, okazinta en Ostendo (Belgio), de la 27^a de aprilo ĝis la 1^a de majo.

Pli ol 300 homoj el 20 landoj aliĝis kaj vigle partoprenis en la programo, ege densa pro kunvenoj, vizitoj, ekskursoj, turismado.

Eĉ tri la temoj: «Ekologio, ŝlosilo por la 3^a jarmilo» – «Eŭropa Unio» – «Interkulturo». Ĉu eblas plenumi ĉion dum 5 tagoj? Certe jes, sub la asidua flegado de la ĉieestanta Flory Witdoeck, kiu, altvalora entreprenistino, trudis al kongresanoj preskaŭ striktajn labortempojn!

Fakte la inaŭgura vespero ne estis “interkona” – kutima babilado ĉe pluraj kongresoj – sed “laboremega” per pratika prezentado de la temoj tra la prelegoj de U. Broccatelli pri «Eŭropa Unio», S. MacGill - «Interkulturo» kaj Frederik Van den Brande - «Kompostado, ekologia faktoro». La inaŭguran kunvenon plibriligris muzikaj interludoj de Karlo Dohnal, klarnetisto, kun la edzino Ksenia Sljathovta, rusa violonistino, kaj Dirk Ooms, pianoludanto.

Tiu senhalta interplektiĝo de kongrestemoj kaj kleriga turismado daŭris la sekvan sabaton en Bruselo. La kunveno «Eŭropa identeco, ideologio kaj lingvo» kunordigis Hans Erasmus, estro de la Brusela Laborgrupo pri la Lingvoproblemo de Eŭropa Unio, kaj Michael Cwik, ekonomikista funkciulo ĉe Eŭropa Komisiono. Antaŭvidita estis ebleco kolokvi kun kelkaj eŭroparlamentanoj sed pro ... parlamenta ferio (ĉu oficiala senkulpiĝo?) ili rezignis: ĉeestis nur eŭroparlamentano Nelly Maes. Per sia prelego, ŝi intencis defendi la plurlingvecon, sed la sekvaj diverstemaj intervenoj de pluraj aŭskultantoj eble efikis sur ŝia konvinkiteco ĉar konklude ŝi promesis ... eklerni Esperanton.

Sekvis paroladoj de prof-ro Joseph Országh de Universitato de Mons, komparanta la problemon de efika internacia komunikado kun tiu de mastrumado de polucitaj akvoj; kaj de Zlatko Tišljár, kiu per efika priskribo de la plurnivela homa konscio de aparteneco – familia, vilaĝa, regiona, nacia – enkondukis al «Eŭropa identeco». Vigle debatis, poste, la ĉeestantoj.

Tagmanĝa paŭzo: tute hazarde mi elektis kafeterion, kies mastrumantinon, napolaninon jam 40 jarojn en Bruselo, tre ĝojigis la ebleco paroli itale. Sed tuj al la trarigardo de la ĉefurbo – vivoplana, rememoriganta la konstruaĵojn de la itala “reĝa” Torino – kaj posta vizito al la belega Urbodomo en «la plej bela placo de la mondo» – kiel orgojle (sed malmode) min alparolis belga kongresano.

La sabata ekskurso al *Raverssijde* kondukis ĉiujn – bicikle, trame aŭ aŭtobuse – al la plenaera muzeo *Atlantikwall*, la fifama Atlantika Muro, memoraĵo de la lasta mondmilito, kaj al la memorigejo de la Princo Karlo, iama Regento de Belgio dum la sama milito. Por iuj eble normalaj vidindaĵoj, sed aparte elvokantaj por tiuj, kiuj travivis tiun epokon.

La nemalhavebla bankedo konkludis tiun intensan tagon, sed vere estis pli gustumindaj la legomsupo ĉe senpretenda gastejo, la lastan vesperon, aŭ la grandegaj salikokoj frititaj ĉe la havenrandaj budoj meze de ĉirpe

petolantaj laroj.

Daŭra klerigado vere estis la slogano de la kongreso. Eĉ sur la boato, kiu veturigis nin dimanĉe al *Nieuwport*, du prelegoj – fare de W. M.A. De Smet pri «Delfenoj kaj Balenoj en la Norda maro» kaj de la geedzoj Robineau, kun lumbildoj, pri ilia okjara mondvojaĝo. Intertempe la grupo **PERSPEKTIVO** organizis “Forumo”-n pri farindaĵoj favore al Esperanto.

La kongreso solene fermiĝis lunde per la kutimaj alparoladoj, salutoj, dankesprimoj, laŭdoj kaj flordonaĵoj al organizantoj, sed krome per eminenta konkludo. Per aklamado, la kongresanoj aprobis gravan rezolucion favore al starigo de «Konstanta Konferenco de Eŭropa Unio pri la Eŭropa Lingvo-Problemo». Estas problemo, kiu malrapide sed pli kaj pli elstariĝas ĉe la eŭropaj institucioj, kaj la trafa agado de Eŭropa Esperanto-Unio celas kontribui al ĝia solvo.

Nelacigeble.



La premanta bezono de taŭgaj terminaroj en nia lingvo pli kaj pli puŝas bonvolajn studemulojn engaĝi sin en tiu giganta laboro de aktualigo kaj kompilado de pli kompletaj vortaroj, por ke nia lingvo - per plena vortprovizo - fiere, egalrajte kaj samnivele apudstaru la tiel ditajn «naturajn lingvojn».

Jen alvokoj bonvenigantaj kunlaborantojn por tiu malfacila tasko:

⇒ Sub la instigo de Kent Jones, kiu entreprenis valoran sed malfacilan taskon cele al enkonduko de Esperanto kiel lingvo por AVIADO, mi akceptis la respondecon por la aktualigo, kompletigo, kompilado de aviadaj terminoj. Eble iuj havas ion pri aviado. Se jes, mi ŝatus ricevi eventualan kunlaboraĵon, listigitajn terminojn ks. Atendas viajn informojn:

Gilbert Ledon <ssledon@iconet.com.br>

⇒ Mi pretigis la unuan version de la **ASTRONOMIA TERMINARO (AT)**, por kiu laboras mi kaj aliaj kolegoj. Mi invitas la interesiĝantojn viziti nian paĝon ĉe http://members.xoom.com/astro_esp/terminar/terminoj.htm

La nuna stato de AT estas vortaretiska, enhavanta precipe – sed ne sole – PIV-ajn astronomiajn terminojn. Tamen ĝi kreskos en la direkto de terminaro, kaj tial ni uzas la nomon «Astronomia Terminaro». Por tio, ni estas diskutantaj en alia poŝtlisto (tiu de la astronomia Esperanto-klubo). Unu el niaj plej ĵusaj decidoj estas la uzo de la perkomputila vortarstrukturo de **VoKo**, la projekto lanĉita de alia listano, Wolfram Diestel. Lars prizorgas tiujn aferojn. Lia nuna xml-versio de AT estas videbla ĉe <http://esperanto.warande.uu.nl/AT/> kaj enhavas nuntempe nur 7 aŭ 8 terminojn, ĉar ni ĵus komencis la transprenadon de la word/html -dosieroj al xml-formaton.

Helio Jaques <atreju@zipmail.com.br>

⇒ **RADIKARO DE ESPERANTO - EN LA RETO!!!**

En mia paĝo: <http://www.volny.cz/malovec/radikaro.htm> mi metis kiel kromprodukton de mia vortarista laboro la radikaron de Esperanto por helpi aliajn vortaristojn, kiuj intencas krei Esperantan-nacilingvan vortaron. La radikaro estas pli ampleksa ol en PIV, sed kompreneble sen PIV kaj aliaj paperaj vortaroj ĝi ne utilos.

Ĝia tasko estas doni skeleton por la novaj vortaroj, kiun oni poste devas traduki en la nacian lingvon kaj komplet-

igi per derivaĵoj, frazeologiaj esprimoj ktp. Tamen ĝi povas ŝpari 25% da laboro kaj esti bona starto por novaj vortaristoj.

⇒TERMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO

Al la najbara paĝo <http://www.volny.cz/malovec/tec.htm> mi almetis rezultojn de Terminologia Esperanto-Centro por helpi al novaj fakuloj informiĝi pri la ĝisnunaj atingoj.

Miroslav Malovec starto@clavis.cz

⇒ASEKURA TERMINARO: PROVLEGANTO SERĈATA

Asekura terminaro estas preskaŭ prespreta. Enestas pli ol 1200 terminoj en ses lingvoj (EN, DE, NL, HU, FR, ES). Ankoraŭ estas bezonata anglalingvano (prefere el Britio), kiu scias ion pri asekuroj.

Kontaktu Marc Vanden Bempt <marc@esperantu.nu>

⇒PELTISTOJ SERĈATAJ


Samideano Lubomir Streda, aŭtoro de terminaroj pri feloj kaj peltoj (TERMINARO DE PELT-INDUSTRIAJ MAŜINOJ, EKIPAĴOJ KAJ ILARO, 1979; TERMINARO DE PELT-INDUSTRIAJ OPERACIOJ, 1981; TERMINARO DE FELOJ, 1998) serĉas esperantistojn, kiuj laboras aŭ iam ajn laboris en peltistiko, same ankaŭ zoologojn, zoografojn, bredistojn kaj ĉasistojn, interesiĝantajn pri tiu fako kaj preparataj terminaroj. Jen la adreso: S-ro Lubomir Streda, Podebradova 82, 542 32 Upice, Ĉeĥio, Eŭropo.

Retajn mesaĝojn por li povas akcepti ESPERANTO-MUZEO en Ceska Trebova: Kulturni.Klub@ct.anet.cz aŭ redaktoro de STARTO, Miroslav Malovec: starto@clavis.cz

Horora Filmo en Esperanto

Pri ĝi donas informojn Cornelia Rau:

Eble vi jam delonge scias pri la fakto, ke horora filmo el la jaro 1965 aperis plene en Esperanto. Mi sufiĉe surpriziĝis, kiam mi hazarde, dum retumado, trafis sur ĝian anglalingvan hejmpaĝon. Ĉi-sekva artikolo eble taŭgas por distribuo. Agrablajn inkubojn!



Ĉu Kapitano Kirk parolis Esperanton? Ne! Sed la aktoro William Shatner iam uzis nian lingvon, nome en la horora filmo INCUBUS, farita en 1965, kelkajn jarojn antaŭ ol Shatner famiĝis kiel Captain Kirk en la filmserio STAR TREK. INCUBUS, kies dialogoj estas tute en Esperanto (kun anglaj subtitoloj), kuŝis dum longa tempo en iu arkivo, ĝis kiam antaŭ nelonge ĝi reaperis el la forgeso.

Kial la produktoroj elektis ĝuste Esperanton? Fakte la lingva problemo longe okupis ilin. La ĉefaj figuroj de la filmo, la demonoj *Incubi* kaj *Succumbi*, estis ne nur supernaturaj, ili estis ankaŭ supernaciaj estaĵoj. Etnaj lingvoj kaj ties dialektoj do, ne taŭgis kaj iun galimatian lingvaĵon aŭ Volapukon la geaktoroj ne ŝatis uzi. Tiel oni decidis, ke Esperanto estu la ideala lingvo por la fortoj de l' tenebro.

Pri la enhavo nur tio: La filmo rakontas pri belaj demonoj, kiuj serĉas purajn animojn, kun la celo detrui ilin. Klasika horora scenaro do, kiu foje similas al la stilo de Ingmar Bergman.

Kopio de la videobendo kaj afiŝo haveblas nuntempe nur pere de la interreto: <http://www.amazon.com> (filmo) aŭ <http://www.incubusthefilm.com> (filmo + afiŝo)

Pensiga vivosperto rakontas Ruben el Kolombio

Post la vizito al Armenio por prepari kelkajn detalojn pri la venonta kolombia kongreso, Bibiana Cifuentes kaj mi reiras hejmen. La vojo estas pli-malpli longa (tri horojn) kaj la ŝoseo transpasas kampojn de kano, de maizo... La pejzaĝo estas vere bela kaj la trafiko ne estas densa (estas sabato je la 4^a posttagmeze).

Subite aŭto, kiu veturas fulmrapide, aperas ĉe kurbigo, perdas la kontrolon kaj bategas ŝarĝaŭton kiu iras 200 metrojn antaŭ ni!

“Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile!

El mia brusto nun ne saltu for!”

Bibiana kaj mi tuj elaŭtiĝas kaj alproksimiĝas al la loko de la akcidento nur por trovi danteskan scenon. Estas kvar personoj en la aŭto. Sinjorino (nevundita) eliras el la preskaŭ detruita aŭto kun infano, kies dekstra kruro estas rompita. Sed en la aŭto restas du homoj kiuj ne povas eliri. Sur la malantaŭa sidilo sidas junulo kies dekstra kruro ankaŭ estas rompita! Li tute ne scias kio okazas, sed almenaŭ estas duonkonscia. En la antaŭa sidloko, apud la duonfrakasita pordo de la stirila flanko, kuŝas homo kiu estas kaptita de la distorditaj feraĵoj de tio kio, antaŭ dek sekundoj, esti la antaŭa parto de la aŭto.

“Jam teni min ne povas mi facile!”

Bibiana, kiu studas la unuan semestron pri flegado, helpas la infanon. Krom la kruro, li estas en relative bona stato. Intertempe mi klopodas helpi la kaptitan homon, sed mi tute malsukcesas. Li ne povas moviĝi. La feraĵoj ne donas al mi ŝancon mildigi lian evidentan suferon. La ŝoforo de la kamiono estas en ŝoka stato kaj nur gapas senage.

“Ho, mia kor’!”

La sinjorino kaj la infano komencas paniki kaj Bibi helpas la junulon de la malantaŭa seĝo. Lia situacio estas kritika... Li suferis bategon en la kapo. Sed li vokas la amikon: «Maŭrisjo!» Sed Maŭrisjo ne respondas. Ni devas ion fari kaj fari tion rapide! Ne estas domoj en tiu parto de la ŝoseo... Bibi kaj mi komencas disrompi la feraĵojn por liberigi Maŭrisjon sed niaj fortoj ne sufiĉas. Nepe ni bezonas plian helpon.

Ni ne havas telefonon. Ni estas tute solaj...

“Ho mia kor’!”

Ni baraktas por liberigi Maŭrisjon, kiu apenaŭ povas spiri, kaj samtempe ni klopodas helpi la infanon kaj la junulon. La situacio estas terura. Aperas alia aŭto kaj subite iu diras malantaŭ mi: «Ruben, kio okazis? Mia Zamĉjo!!!» Estas Antonio Alzate, alia esperantisto kiun mi ne vidis de la pasinta nacia kongreso! Li havas porteban telefonon kaj tujtuje informas pri la akcidento, petas helpon kaj ambulancon... kaj komencas helpi nin.

Bibi kontrolas la pulson de la vunditoj. Alvenas alia aŭto. La sinjorino kaj la infano estas alsenditaj kliniken, post kiam mi raportas pri la bona farto de la homoj ankoraŭ en la aŭto (nur mensogo por trankviligi la sinjorinon). La esperantista triopo promesas ne forlasi la vunditojn kaj la sinjorino foriras kun pli da sereneco kaj multe da konfuzo. Venas aliaj aŭtoj kaj kamiono. Sed... ne la ambulanco. Bibiana konstante kontrolas la spiradon de la vunditoj kaj nun precipe la pulson de Maŭrisjo.

Maŭrisjo, sekundon post sekundo, spiras pli malfacile

kaj ankoraŭ estas inter la feraĵoj de la detruita aŭto. Ni decidis prizorgi la junulon, dum la aliaj helpantoj liberigas Maŭrisjon. Antonio enaŭtigas la junulon en sia aŭto kun la helpo de aliaj homoj kaj forkuregas kliniken.

Restas nur Maŭrisjo. Pasis la tempo kaj ni ne povas liberigi nek helpi Maŭrisjon. Bibi mezuras la pulson kaj alarme informas: «... kvardek minute!» Post duono da minuto ŝi diras: «Maŭrisjo ne spiras...» Samtempe oni sukcesas liberigi la vunditon kaj, metante lin surplanke, Bibiana konstatas ke la koro ne funkcias!

Ŝi donas al Maŭrisjo ritman kor-masaĝon kaj mi samtempe enblovas aeron en liajn pulmojn buŝ-al-buŝe. La revivigo daŭras dum tempo kiu ŝajnas esti eterna.

“... Post longa laborado

ĉu mi ne venkos en decida hor’!”

La cetero de la ĉeestantoj ĉirkaŭas nin kaj neniuj povas kredi kio okazas. Post tempeto mi aŭskultas, per mia orelo sur la brusto de Maŭrisjo, eksterordinare malfortan korbataĵon... Tio ĉi redonas al ni forton kaj ni atendas kelkajn sekundojn por vidi, ĉu la koro de nia amiko (li estas nia amiko nun) reekbatas... sed vane. Ni insistadas. Post longa reviviga laboro kaj konstanta aŭskultado de la brusto de Maŭrisjo, ni komprenas ke li ne vivos plu. La ambulanco ne venas, ĉar la plej proksima hospitalo estas kvindek kilometrojn for. Post dek kvin minutoj la morto venkas. Ni tute ne scias kion fari...

Kiam li ankoraŭ vivis ni agis rapide, vere nia esperanta triopo, kunigita per mirakla hazardo, estis diligenta kolegaro. Sed nun, kiam Maŭrisjo kuŝas senviva, mi sentas ke mi estas sentaŭgulo, idioto. Mi sentas ke mi estas tute senpova estaĵo, kiu nenion povas fari kontraŭ fortoj kiujn mi ne komprenas.

Mia unua konsolo estas pensi, ke ni agis laŭ nia plej bona intenco per la malmultaj rimedoj kiujn ni havis. Sed venas al mia kapo io kion mi antaŭe ne konsideris. Multaj personoj helpis, sed nur la tri esperantistoj agis aŭtomate, decidege, senhezite. Mi ne deziras malgrandigi la laboron de tiuj aliaj kiuj helpis nin. Sed vere io motivis nin pli forte ol niajn kunhelpantojn.

Mi ĝenerale pensas, ke Esperanto estas nur lingvo, sed post la morto de Maŭrisjo mi komencas pensi, ke tiu pli granda impulso, tiu pli granda help-preteco, ke tiuj spontaneaj reagoj havas sian fonton en la ideoj kiuj ĉirkaŭas nian lingvon Esperanto.

Mi ne scias, ĉu mi pravas aŭ ne. Mi ne scias, ĉu mia rakonto estis tro kruda aŭ ne. Mi ne scias, ĉu intermiksi la versojn de nia kara Luĉjo estis prudenta aŭ ne.

Kion mi firme scias estas, ke tri esperantistoj hodiaŭ, en la kampoj de Kolombio, donis al Maŭrisjo lastajn minutojn plenajn de amo, de esperanta amo.

“Ho, mia kor’!”

Jubileo 2000 → En Udine

La 25^{am} de junio Pastro Nello Marcuzzi celebros esperantlingvan Di-servon en la Baziliko *Madonna delle Grazie*. Oni kunvenos je la 15.30 antaŭ la preĝejo: en la apuda monaĥejo okazos mallonga parolado pri historio kaj celoj de la Jubileo. Sekvos je la 16^a horo la Di-servo. Pli poste, helpe de surlokaj fidindaj «ĉiĉeronoj», tiuj, kiuj malemas fasti kaj rekonas la bonfarajn efikojn de maldieto, povos viziti tipan gastejon, por gustumado de la specialaj vin- kaj gastronomi-produktoj de Friulo.

Denove interreto serve al justaj motivoj

PRO MONDA MALSATO KAJ PLUV-ARBAROJ

Ĉu vi memoras pri la TTT-ejo kontraŭ malsato en la mondo? Klakante unufoje ĉiutage sur la butono *Donate free food*, komerca sistemo de sponsoroj kaj varbado (almenaŭ ĉi-foje) agas tre pozitive, atribuante difinitan kvanton da mono al la monda nutro-fonduso je ĉiu klako. Tiu mono utilas por savi de malsato la plej malriĉajn popolojn de la planedo.

Nun aperis simila TTT-ejo, uzanta la saman formulon: temas pri la ejo de pluvbaroj! Je ĉiu klako, terpeco estas aĉetata danke al la mono de la sponsoroj por ĝin savi de arbar-hakado. Konsideru, ke la pluvbaroj estas unu el la plej gravaj bremsiloj kontraŭ la forceja efiko, kiu estas katastrofe varmiganta nian planedon; konsideru ankaŭ, ke en la pluvbaroj koncentriĝas miloj da vivuloj, kelkaj eĉ ne konataj al la homo, kaj kiuj povus utili por malkovri kuracilojn kaj aliajn aferojn ege utilajn por la homa medicina progreso: vi havos do, du tre fortajn motivojn por viziti ĉiutage tiun ĉi gravegan ejon (mi aldonus ankaŭ la neceson, por ke la tero estu bela, ke oni respektu bestojn kaj plantojn kaj, kompreneble, la rajton je tradicia vivo, ekzemple, de la amazoniaj indiĝenoj!!!).

Jen la du adresoj:

⇒ PLUVBAROJ - <http://www.therainforestsitesite.com/> (alklaku **Donate Free Land**)

⇒ MONDA MALSATO - http://www.thehungersite.com (alklaku **Donate Free Food**)

Ne forgesu do viziti ambaŭ ejojn unu fojon ĉiutage kaj komuniki la iniciaton al viaj parencoj kaj geamikoj!!!

Daniele Vitali - Daniele.VITALI@cec.eu.int

Shimon Peres

Alta Protektanto de la 85a UK

Shimon Peres, laŭreato de la Nobel-pacpremio en 1994 kaj kuniniciatinto de **MANIFESTO 2000** por Kulturo de Paco kaj Senperforto, akceptis la inviton de UEA esti Alta Protektanto de la 85^a Universala Kongreso de Esperanto en Tel-Avivo. Li ja estas konata kiel unu el la arkitektoj de la pacprocezo en la regiono, kies loĝantojn tiom longe turmentis malamo.

La Ministro kaj Esperanto

ITALA ESPERANTO-FEDERACIO estas esploranta la eblecojn kontakti la novan Ministron pri Instruado, d-ro Tullio de Mauro, kiu dum la lastaj jaroj agnoskis la valoron de Esperanto.

Dum oni petas NE AMASE KONTAKTI LA MINISTRON por eviti ĝeni lin en certe streĉiga periodo, oni ne povas ne rimarki, ke la libro **MANUALE DI ESPERANTO - MIGLIORINI** havas antaŭparolon de d-ro De Mauro.

Tiu ĉi estas certe bona ilo kun instruistoj kaj lernejestroj: «Esperanto valoras, tion diras la Ministro mem ...»

Inform-artikoloj ŝuldeblas al RET-INFO.

BULTENO de la membroj de

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Sidejo: Via Crispi 43 - 34125 Trieste

Tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperanto@retecivica.trieste.it; nored@tiscalinet.it

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio

Poŝtĉekkonto N° 10834349